Ho ve, iam eĉ mi estis juna ...

Dum la studentaj jaroj mi loĝis diversloke, sed plejparte en pensiono en Ashgrove, antaŭurbo de Brisbano. Maljunulino nomata de ĉiuj "Madam" dependis de la pago de siaj ĉambroluantoj. Ŝi heredis monon, sed iam io misis. Ni junuloj tre ŝatis la maljunan karulinon, kiu estis krome invalida.

Tiutempe la lasta skandaltemo estis "piĵamaj vesperoj", kaj speciale se ili okazis apud naĝejo. Junulino en piĵamo, se ĵetita en naĝejon, donas sufiĉe klaran impreson pri sia korpoformo. Kelkaj ĵurnalistoj salivumis kaj ege volonte publikigis fotojn de tiaj "viktimoj": la ŝajnriproĉa tono de la komentaro estis nur pravigo de la ŝanco vidigi senhontajn pornografiaĵojn. Do kelkaj el ni knaboj starigis sur la gazono de Madam grandan afiŝon: PIĴAMA VESPERO HODIAŬ: NAĜEJO MALANTAŬ DOMO. Kiam la maljunulino eksciis pri la skandala afiŝo, ŝi unue blankiĝis, tiam iom post iom ridetis, kaj fine ridegis.

^^^

Unu el la kunluantoj estis Steve, kiu ambiciis fariĝi anglikana pastro. Mi donis al mi la taskon konvinki lin, ke la "tri-branĉa teorio" estas nevalida. La anglikan-katolikoj, kiel ili sin nomas, parolas pri tri branĉoj de unu Vera Eklezio: la katolika, la grek-ortodoksa, kaj la anglikana. Mi klopodis atentigi Steve, ke tio ne eblas, se la plej granda el tiuj tri rifuzas akcepti la teorion. Mia sentakta premado devigis Steve aranĝi intervjuon por mi kun anglikan-katolika pastro, kiu estis krome eklezia historiisto. Steve nur aŭskultadis. Kompreneble nek la pastro nek mi konvinkis la alian, sed mi sentis memflatan superecon. Oni bone sciis, ke multaj anglikanoj suferas je "roma febro", la timo, ke eble Romo tamen pravas. Ni katolikoj neniam suferis je "anglikana febro". Aĥ ja, ni estis tiel superaj kun nia glora historio kaj nia aŭtoritato, kaj ni povis nur kompati la povrulojn, kiuj sentis tenton aliĝi al ni, sed ne havis kuraĝon por la lasta plonĝo.

Religio estis ofta diskuttemo en nia pensiono. Ofte la instiganto de la diskuto – aŭ polemiko – estis nia ateisto John Frisch. Frischy estis tre inteligenta, ĉiujare la unualoka studento en la Fakultato de Agrikultura Scienco. Li malestimis ĉion, kio ne konsistis el faktoj-faktoj-faktoj. Iun tagon li vidis min legi romanon, kaj komentis, ke tia aferaĉo estas kompleta tempoperdo. Mi serioze demandis, ĉu li neniam sentis la potencon de bona romano. Neniel, li diris, romanoj estas bovosterkaĵoj elpensitaj de aĉuloj dezirantaj enspezi monon per produktado de ekskremento kaj ekspluatantaj la stultecon de aliaj homoj, kiuj ial legas tian fekaĵon. Ne, por Frischy ekzistis nur faktoj, faktoj, kaj faktoj. Religio estas alia bovosterkaĵo elpensita de pastroj por gajni potencon super aliaj homoj. La konceptoj de John Frisch pri religio rezultis el lia observado de Amish-simila sekto en lia hejmregiono, homoj, kiuj rifuzis modernajn sciencon kaj teĥnikon. Absoluta bovomerdo, kompreneble.

Mi demandis John, ĉu estas ia celo, ia signifo en la vivo. Kompreneble ne! Sed dum ni estas ĉi tie, ni restu ĉe la faktoj – ekzemple agrikultura scienco – kaj rifuzu rilati al ĉia formo de bovofekaĵo. Nu, sendube estis konsekvenco en tiu morna vivkoncepto. Mi min demandas, kion John pensas nun, sesdek jarojn poste.

^^^

Amuza incidento marĝene rilatis al religio. Mia kuzo Bill kaj mi ambaŭ veturis trame en la urbocentron, kaj poste li pluiris al la universitato kaj mi al la pedagogia altlernejo. Ni ofte veturis kune en la mateno kaj ne eblis, ke ni ***ne*** vidu rave belan nigraharulinon, kiu en- kaj eltramiĝis ĉe haltejo 14. Tiutempe viroj sidis en unu fino de la tramo kaj virinoj en la alia, kaj ne eblis, ke ni alproksimiĝu en troplena tramo al tiu mistera ravulino. Sed tio ne signifas, ke ni ne salivumis pri ŝi: tiuj perfektaj brovoj super brile bluaj okuloj, la grandiozaj ruĝe ŝminkitaj lipoj, la svenige bela figuro kun elstaraj mamoj, la perfektformaj maleoloj, ktp.

Ni devis doni nomon al nia diino. Nia imagopovo estis iom magra, do ni nomis ŝin Haltejo Dek Kvar. Kian voĉon havis Haltejo Dek Kvar? Certe neesprimeble belan. Ŝi povintus pozi por Raffaele, sed ŝi estis multe pli bela ol liaj aliaj madonoj. Sed kiel renkonti HDK en preme plena tramo?

Aha, mi ekhavis sagacan ideon. Ni loĝis apud haltejo 20. Ni povus ekiri iom pli frue kaj marŝi – ĝis haltejo 14! Certe nia premio estus mallonga sed signifoplena konversacio la unuan fojon, sed kun probableco de ĉiam plilongiĝantaj interparoloj poste. Ni disputis inter ni, kiu gajnos ŝian koron. Mi estis iom pli aĝa, pli altkreska, pli bela, sed Billy estis memfida junulo kun forta altirpovo laŭ la propra takso. Mi kredis, ke mi tamen havas atuton: tia belulino, memoriga pri sudeŭropa princino, devis esti katolikino, do evidente mi havis avantaĝon kontraŭ mia protestanta agnostikula kuzo.

Do ni ekmarŝis pli frue ol kutime kaj piedis de haltejo 20 ĝis la 14-a. Sed ni ricevis nenian premion. Haltejo Dek Kvar ne estis ĉe haltejo 14. Ni ripetis la projekton tri fojojn sinsekve. Vane. Kio okazis? Ĉu ŝi malsanis? Ĉu ŝi transloĝiĝis? Ĉu ŝi komencis novan laboron kun novaj horoj? Ni cerbumadis, kaj fine Billy deklaris, ke li lasos fali la stultan projekton. Nu bone, mi respondis, sed mi daŭrigos, kaj poste mi eĉ ne invitos vin al mia geedziĝfesto kun Haltejo Dek Kvar. Bill grumblis, sed ni ja ekmarŝis la postan matenon. Billy ĵuris, ke li neniam plu lasos virinon idiotigi lin, se HDK ne estos surloke.

Kaj jen, jen! Kiam ni estis nur cent metrojn de nia celo, ni ekvidis ŝin, la objekton de niaj revoj. Aĥ kiel bela! Absolute adorinda! Ŝi pacience atendis ĉe la haltejo, ne konscia, ke ŝia Destino alsturmos ŝin post kelkaj momentoj. Fakte nek Billy nek mi elpensis nian prologon: kiel ni nin prezentu?

Niaj paŝoj malrapidiĝis, dum ni serĉis la ĝustajn vortojn. Sed – ho ve! Ni vidis, ke alia junulo proksimiĝas al nia predaĵo, eble dek metrojn antaŭ ni. La malamiko evidente diris ion al ŝi, ĉar Madono sin turnis al li kaj elkraĉis per voĉo simila al knaraĉanta ĉarniro: “Forfikiĝu!”

Billy kaj mi haltis kaj nin rigardis senkonsile. Ni eĉ retiriĝis kelkajn metrojn por diskuti la postan paŝon. Billy atentigis, ke mi, katolika kreteno, devas nun forstreki ŝin el mia listo, sed li, mondumulo, donos al ŝi pluan ŝancon. Mi ŝultrumis: miaj revoj estis frakasitaj de unusola vortaĉo. Billy rektigis sin kaj en- kaj elspiris, sed ial rezignis pri sia plano, kia ajn ĝi estis.

Efektive ni neniam plu vidis Haltejon Dek Kvar. Miaj bedaŭroj estis minimumaj. Bona katoliko ne povis rilati al tia fibuŝulino.

^^^

Malpli amuza estis incidento kun potenciale mondodetruaj sekvoj, kiu dumtempe amarigis miajn rilatojn kun Billy. Estis la “kuba misil-krizo”. Billy koleris, ke la usonanoj volas tirani la kubanojn, kiuj absolute rajtas sin defendi, kaj se Sovetunio volas helpi la kubanojn, tio ne koncernas la usonanojn. Mi reĵetis, ke Billy naive aŭskultas la ruĝulojn en la universitata kafejo, kiuj disvastigas tie siajn torditajn versiojn de la vera situacio.

Aŭskultu, Bill, mi diris, la usonanoj savis nin de la japanoj, kaj ili estas nia sola espero kontraŭ la mondvasta komunista komploto. Kiel Billy sin sentus, se iu starigus bombon en lia malantaŭa korto kaj minacus eksplodigi lian domon? La usonanoj plene rajtas sin defendi, kaj krome ili havas karisman kaj bonan prezidenton (mi ne diris ***katolikan***, sed tion mi opiniis), kiu havas la timigan taskon savi la liberan mondon.

Kaj ŝajne mi vetis je pli bona ĉevalo ol Billy. Kennedy rezistis la rusan agreson kaj Ĥruŝĉov devis cedi kaj forpreni ĉiujn rusajn misilojn el Kubo: klara venko de demokratio super malbono. Nur multajn monatojn poste ni eksciis, ke la rezulto estis pli “egalvenko” ol usona triumfo; kompense la usonanoj devis retiri raketojn el Turkio, kiuj celis rusajn urbojn (Kennedy, kiu draste bezonis venkon, petegis Ĥruŝĉov ne anonci tuj la usonan cedon).

Kaj oni ne sciis ĝis multaj jardekoj poste, ke la vera heroo estis nek Kennedy nek Ĥruŝĉov, sed Vasilij Aleksandroviĉ Arĥipov, rusa admiralo, kiu nuligis ordonon de kapitano de sovetia submara ŝipo ekpafi nuklean raketon al postĉasantaj usonaj ŝipoj. Unu bombo ekbruligintus la tutan mondon.

Mia aludo al Kubo kiel la “malantaŭa korto” de Usono perfidis la nivelon de mia tiama politika informiteco.

Nelonge poste JFK estis murdita. Estis universala demando de mia generacio: kie vi estis, kiam vi aŭdis pri la morto de Kennedy? Mi memoras, kvazaŭ okazintus hieraŭ. Mi estis enlite, kiam la servistino de Madam, Marie, ekscitite sturmis en la dormoĉambron, kiun mi dividis kun Billy, kaj elĵetis la vortojn "Ili pafis Kennedy!" Ho ne, mi pensis, li estas alpafita! Ne grave vundita, mi esperis.

^^^

Dum kelka tempo mi kunloĝis kun mia frato Clive en pensiono en Bardon. Niaj luigantinoj estis du maljunulinoj, fraŭlino Redwood kaj ŝia vidviniĝinta fratino. Fraŭlino Redwood estis tre aminda grandaĝulino, mirige aktiva. Ĉiumatene ŝi partoprenis en meso, poste vizitis solecajn homojn. Fakte ŝi pasigis la tempon farante bonaĵojn al aliaj homoj, kaj ĉiam mienis svage sed amikeme, ridetis tre milde kaj parolis trankvilige. Parte pro ŝiaj grizaj haroj kaj pala vizaĝo Clive kaj mi nomis ŝin “Casper” laŭ la komiksa figuro Casper, la amika fantomo.

La alia fratino estis draste malsama. “Mia fratino estas freneza!” estis ŝia kutima boja komento pri la ĉiutaga pilgrimado de la bonfara Casper. Ni nomis ŝin “Bruno” (la urso) pro ŝia bruska graŭlado.

Sed ankaŭ Bruno havis pli mildan flankon de la karaktero. Iel ŝi sciis, kiam estas mia naskiĝtago, kaj ŝi preparis alkoholajn trinkaĵojn, ke ni ĉiuj celebru la gravan eventon. Mi provis klarigi al ŝi pri mia ĵurpromeso (neniam trinki alkoholon), sed ŝi rifuzis aŭskulti.

“Ne parolu absurdaĵojn! Trinku tiun vinon!” Mi avertis ŝin, ke mi suferos epilepsian atakon, se eĉ guto da alkoholo enirus mian buŝon. “Trinku kaj ĉesu diri sensencaĵojn!” ŝi bojis. Do mi metis la glason al miaj lipoj, ŝajnigis iom gluti, tiam mi kolapsis planken, ruliĝis surdorsen, ĵetis kun freneza energio ĉiujn kvar membrojn, kaj eligis bruojn de demonposedato. Clive devis subpremi sian ridemon, kaj ŝajnserioze diris: “Jen kio okazas al li, se li trinkas alkoholon.”

Bruno povis nur krii “Nekredeble!” kaj resti kun la buŝo malfermita. Iom poste mi povis normaliĝi kaj ree eksidi kaj trinki oranĝosukon. Clive ne protestis, ke nun li devas trinki ankaŭ mian vinon.

Casper pasigis multajn jarojn en la 1910- kaj 1920-aj jaroj en Anglio. Ŝi planis reveni al Aŭstralio kaj eĉ aĉetis sian ŝipbileton. Sed la tagon antaŭ la planita vojaĝo “vastadimensia policisto” aperis antaŭ ŝia pordo, malvolvis grandformatan dokumenton, kaj kriis, “La Reĝo kontraŭ Redwood!” Ŝi ŝuldis ankoraŭ ses pencojn al la impostoficejo, kaj la reĝo absolute ne permesis al ŝi forlasi la landon.

Malgraŭ siaj vojaĝoj kaj bonaj faroj Casper diris ion, kio fiksiĝis en mia memoro. Ŝi kaj mi konversaciis pri diversaĵoj el ŝia vivo kaj subite ŝi, fiksinte sian homaman rigardon al iu punkto mil mejlojn for, kaj ridetante kun la kutima bonvolo al ĉio surtera, ŝi komentis: “Vidu, alilandanoj estas la plej strangaj homoj …”

^^^

Kvankam ŝajnas nun nekredeble, mi sukcesis vivi de tiu taga buĝeto de £1. Loĝado kostis £3.10.00 semajne, transporto pli-malpli £1 semajne, do estis restaĵeto por aliaj elspezoj. Unu el la regulaj elspezoj estis sabatvespera vizito al Cloudland (Nebulo-Lando), grandega dancareo sur monteto. Ŝajnis al mi, ke mi iĝas ĉiam pli galanta kun virinoj, sed por almenaŭ unu junulino mi estis kompleta fiaskulo.

La tiama tradicio estis, ke oni rezervas la lastan dancon de la vespero por la partner(in)o. Se viro petis nepartnerinon pri tiu lasta danco, tio signalis, ke li volas akompani ŝin hejmen. Nu, mi ne

konis tiun tradicion, kaj iun vesperon mi invitis plaĉaspektan sveltulinon nomatan Gwen al la lasta. Kiam la danco finiĝis, mi intencis akompani ŝin nur ĝis la seĝo, kie ŝi sidis, sed ŝi kaptis mian brakon kaj informis min, ke ŝi loĝas en Annerley – ni iru, ĉar la lasta tramo preterveturos baldaŭ. Ne suspektante ŝian plenan intencon, mi konsentis kunveturi ĝis ŝia haltejo, kaj mi esperis povi kuri por trafi la lastan tramon al mia loĝloko. Sed Gwen firme tenis mian brakon kaj invitis min kuntrinki tason da kafo.

Mi naive supozis, ke ŝi vere volas regali min per trinkaĵo. Do mi eniris la apartamenton, samtempe memorigante ŝin, ke mi devos foriri tre baldaŭ por ne maltrafi mian tramon. Gwen proponis pagi taksiveturon por mi, kion mi kredis tre malavara gesto. Mi sidis en ŝia salono, atendante kafon, sed ŝi revenis el sia dormoĉambro en preskaŭ travideblaj noktovestoj. Ŝi ekparolis pri sia muskolŝvela amiko, kiu bedaŭrinde troviĝis ie en Sidnejo. Ŝi sciis, ke mi estas studento de pedagogio, kaj diris, ke ŝi jam instruas en gimnazio, kio metis ŝin sur iom pli altan nivelon. Ŝi plendis pri soleco, kiam la amiko foriras, kaj bedaŭrinde tio okazis ofte.

Mi esprimis mian bedaŭron pri tio kaj demandis, ĉu ŝi ne plu havas kafopulvoron. Do ŝi sentis sin devigita fakte iri prepari la trinkaĵon. Mi ektrinkis la varman likvaĵon, kaj Gwen eksidis sur la saman sofon kiel mi kaj glitigis sin en mian direkton kaj flustris pri kelkaj el siaj iamaj amorpartneroj, kiuj ŝajne estis ĉiuj “bone ekipitaj”. Mi rigardis mian horloĝon kaj atentigis, ke mi devas foriri tre baldaŭ.

Fintrinkinte, mi ekstaris – fakte mi nepre devis tuj iri. Do Gwen iris al sia pordo kaj staris tiel, ke mi ne povu preterpasi sen iel tuŝi ŝiajn bele elstarajn mamojn. Tiun malfacilan preterpason mi tamen sukcesis piedpinte fari, kaj mi dankis ŝin pro la kafo kaj diris, ke eble ni ree renkontiĝos ĉe Cloudland. La horloĝo informis min, ke ĉiuj tramoj jam enlitiĝis, do mi alterne kuris kaj rapide marŝis la kvin-ses kilometrojn ĝis mia pensiono.

Mi neniam plu vidis Gwen ĉe Cloudland. Eble ŝi ĉeestis, kaj juĝis bone evitadi min.

Kiam mi rakontis pri tio al Eugene de Zilah, elstara esperantisto, li komentis, ke per mia konduto mi volis puni la lascivemon de Gwen. Sed li ne pravis: mi simple estis naive nesperta pri amoraventuroj ...

Elĉerpaĵo en mia aŭtobiografio ***Konvinka kamuflaĵo.***

Trevor Steele